N-o 1.

# BULTENO

1937.
24. II.

DE ESPERANTO-ASOCIO EN ĈSR.

*Redakcio kaj administracio:*
*Praha XIX., Uralské nám. 447.*
*Telefono n-ro 718-41.*

*Redaktas :*
*ST. KAMARYT.*

*Senpage por membroj de*
*Esperanto-Asocio en ĈSR.*
*Aperas sesfoje dum la jaro.*

## Esperanto Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko

**invitas ĉiujn esperantistojn de nia lando organizitajn kaj neorganizitajn**

**al sia**

# REGULA KONGRESO

## en Moravská Ostrava

## la 27.—28-an de februaro 1937.

### PROGRAMO:

**Sabaton,** 27. II. je la 20-a horo en **hotelo „Brioni"**, ul. 1. máje

1. *Amika vespero*
destinita por interkonatiĝo de partoprenantoj kaj por informo pri la solvotaj problemoj. La tuta vespero estos dediĉita al diskuto, kiun malfermos D-ro Stan. Kamaryt per prelego:
**Problemoj organizaj kaj problemoj propagandaj.**

**Dimanĉon,** 28. II. je la 9-a horo en **„Nova urbodomo"**, Prokešovo nám.:

2. *Lego de la protokolo pri la fonda kunveno.*
3. *Raportoj pri la agado kaj pri la kaso.*
4. *Raporto de la revizoroj.*
5. *Ŝanĝo de asocia statuto, parto II. § 3. ch).*
6. *Nia sinteno al internacia organizo.*
7. *Elektoj por vakiĝintaj lokoj komitataj.*
8. *Liberaj proponoj.*

Posttagmeze je la 15-a h. en „Brioni"-hotelo
**kunveno de Regiona Esp. Ligo.**

Ni invitas al tiu ĉi kongreso ĉiujn esperantistojn de nia lando, ankaŭ la neorganizatajn. Sed precipe ni tre petas niajn lokajn grupojn, ke ĉiuj el ĝi rigardu sia honora devo sendi nepre sian reprezentanton al la kongreso. Fariĝu kutimo, ke loka grupo sendas delegiton al sia kongreso, delegiton, al kiu ĝi pagas la vojaĝkoston. Posedo de tiu sumo disponebla estas ankaŭ pruvo pri vivanteco de la grupo. La grupoj legu pri sia reprezento § 13. de la statuto.

DETALOJ. Hotelĉambro unulita kostas Kč 20·—, dulita Kč 40·— (kun ĉio), tagmanĝo aŭ vespermanĝo, tre bonaj, Kč 8·—. Nepre venu ĉiu, kiu povas, ĉar ni atendas aran viziton de samideanoj, kun kiuj ni malofte povas trakti persone.

En stacidomo de Moravská Ostrava ĉeestos sabaton depost la 13-a samideano por akcepti la gastojn. Kiu ne trovis lin, iru senhezite kun fluo de homoj al hotelo aŭ uzu la tramon n-ro „1" al hotelo „Brioni".

* * *

**Sabate,** 27. II. je la 20-a horo en Lidový dům „Na kamenci" en Slezská Ostrava **amika dancvespereto** por tiuj, kiuj ne havos intereson pri temoj de diskutado kaj je la 23-a por tiuj, kiuj estos lacaj pro diskutado.

---

Detala raporto pri agado de nia asocio aperos presite antaŭ la kongreso. Kongresanoj ricevos ĝin en Mor. Ostrava, ĉiuj membroj en dua numero de Bulteno.

---

## *Devo esti organizita.*

Esti esperantisto signifas ne sole scii la lingvon, ne sole estri la lingvon. Ĝi signifas pli: klopodi, ke scio kaj uzado de la lingvo disvastiĝu. Estas rajto de esperantisto esti fiera pro tio, ke li helpas efektivigi progreson de civiliza ilo, kiu signifos plialtiĝon de tuthomara kulturo spirita.

Jean Jacque Rousseau ne estis prava. Kun kresko de civilizo ne malkreskas la nivelo de moralo. Ju pli komplika estas la civiliza kaj ekonomia situacio, des pli severaj estas la normoj, laŭ kiuj estas juĝata etika valoro de faroj. Enpenetro de internacia helplingvo inter la instrumetaro de civilizo signifos ankaŭ altiĝon de morala nivelo de homaro.

Ni, kiuj posedas kaj kulturas tiun gravan helpilon de estonta kulturo, havas ankaŭ devon zorgi, ke tiu instrumeto estu disponigita al la mondo kiom eble plej baldaŭ. Tio estas efektivigebla ekskluzive per organizo. Tial ni ankaŭ ĉe komenco de tiu ĉi jaro povas sole ripeti, la simplan konsilon, kiu estas grava ĝuste pro sia simpleco.

Ni sukcesis en nia asocio kunigi jam ĉiujn aktivajn esperantistojn en nia lando, kiuj ne preferas kunigi kun poresperanta propagando propagandon de aliaj ideoj, kiujn ne ĉiuj same ŝatas. Sed ankaŭ kun ili ni kunlaboras. Neŭtrala E-Centro eniĝis en nian asocion, Bes-Adresaro fariĝis aliĝinta entrepreno, Ligilo estas la sola gazeto pro nia lando, ĝi kaj nia Bulteno kompletigas sin reciproke, kun Moraviaj E.-Pioniroj ni estas en daŭra kontakto, Regiona E.-Ligo antaŭ nelonge decidis aliĝi al ni korporacie. En nia komitato kunsidas sur gvidaj lokoj ankaŭ germanaj amikoj. Ekster tiu ĉi kadro restas ĝis nun sole tiuj niaj germanaj amikoj, kiuj preferis konservi Germanan Esperanto-Ligon en Ĉeĥoslovakio, kvankam ni decidis mortigi la Ĉeĥoslovakan Asocion Esperantistan. Ni ne riproĉas niajn germanajn amikojn pro tio. Ni bone komprenas ilian vidmanieron kaj scias estimi iliajn sentojn. Tamen ni petas ilin, ke ili ankoraŭ foje kontrolu, ĉu ili pravas efektive.

Same kiel ni estas konvinkitaj pri bezono de centra organizo enlanda, tiel ni estas

konvinkitaj pri bezono de organizo internacia. Tial ni aliĝis nian asocion al

**Internacia Esperanto-Ligo**

kvankam ni havis diversajn dubojn pri agmanieroj de la fondantoj. Sed ni trovas bezonon de ekzisto de centro de naciaj societoj tiom grava, ke ni neatentas personajn kaj ideajn malplaĉojn kaj ni jam pagis parton de nia kotizo. Ni jam anoncis ankaŭ Iel-komitatanon por nia Asocio, samideanon Fr. Heikenwälder, redaktoron de Ligilo.

Po ĉiu nia ano ni pagos la Iel duonŝilingon britan, per tio li fariĝos pasiva Ielano. Sed ni nepre petas ĉiujn esperantistojn en nia lando, ke ili fariĝu ankaŭ Ielanoj aktivaj. Ĉar posedo de Jarlibro kaj lego de internacia gazeto estas ne sole fonto de informoj sed ankaŭ tre efika ilo por teni la homon en la movado.

Ni rekomendas al ĉiu pagi la kotizon kiel eble plej baldaŭ. Por pago uzu nian poŝtpagilon, n-ro de la konto 9602. La kotizoj estas por

nia asocio (EAĈSR) Kč 16·—. Krom la membraj rajtoj vi ricevas senpage la Bultenon.) 6 foje dum la jaro.

IEL-membro kun Jarlibro (MJ) Kč 25·—. Krom la servokuponaro ricevos belan Jarlibron, baldaŭ aperontan.

IEL-membro abonanto (MA) Kč 60·—. Krom la Jarlibro ricevas monatan revuon Esperanto Internacia 12 foje dum la jaro.

IEL-membro abonanto de Heroldo (MAH) Kč 120·—. Krom la Jarlibro ricevas semajnan gazeton Heroldo de Esperanto.

IEL-membro subtenanto (MS) Kč 160·—. Ricevas Jarlibron, monatan revuon Esperanto Internacia, valoran libropremion aŭ semajnan Heroldon de Esperanto.

Niaj membroj pagas al IEL je Kč 3·— malpli el ĉiu speco de kotizo.

---

## *Universala Esperanto-Asocio.*

La glora kaj tradicia emblemo UEA ne pereis kiel supozis fondintoj de IEL kaj kiel eĉ ni timis dum iom da tempo. Formiĝis provizora komitato, kiu reprenis eldonadon de gazeto „Esperanto" kaj promesas ankaŭ eldoni Jarlibron. „Esperanto" aperas en jurnala formato dufoje dum la monato. Laŭ tio, kio estas dirita en la ĝis nun aperintaj numeroj, estas videble, ke UEA revenas al sia post Kolonjo forlasita principo esti internacia organizo de individuoj. Tio signifas revenon al sistemo, kiun ni depost komenco de la disputoj rigardis la plej saĝa kaj la plej responda al psikologiaj kondiĉoj de movado.

Ni kompreneble rigardas la plej urĝa bezono organizon de la naciaj societoj. Tial ni senhezite aliĝis al IEL kaj rekomendas al niaj membroj aliĝadi al IEL ankaŭ kiel aktivaj membroj.

Sed ni bone scias, ke multaj el niaj anoj preferos tradicion de UEA. Al ili ni ne malkonsilas eksiĝi el la movado.

Kontraŭe: Ni petas ilin resti en UEA, repagi kotizojn. Ni peras enkasigon de kotizoj ankaŭ por UEA.

Pagante indiku, ĉu Vi pagas por IEL aŭ por UEA. Se Vi nenion diros, ni transdonos Vian kotizon al IEL. Tial ne forgesu indiki precipe, se Vi volas aliĝi aŭ realiĝi al UEA.

Kotizoj de UEA por 1937 estas:
M kun Jarlibro: Kč 20·—.
M Abonanto: Kč 50·—.
M Subtenanto: Kč 120·—. (Ricevas belan premion en libroj.)

Frupagantoj ĝis fino de februaro ricevas premion de frupago.

Kotizojn sendu per nia poŝtpagilo.

La grava manko de nove estiĝanta sistemo estas verŝajna ekzisto de du Jarlibroj. Tio estas certe riĉo superflua. Ni klopodos laŭ nia povo, ke almenaŭ tio estu ordigita, ke aperu unu Jarlibro komuna, se oni pli atentos niajn konsilojn.

---

Mendu de ni eldonitajn **E-ŜLOSILOJN** laŭ normo de UEA:

**ĉeĥan**
**slovakan**
**germanan**

ĉiujn po 1 Kč afrankite. Kiu mendos ĉiujn 3, pagos por ili sole 3 Kč afrankite. Mendojn sendu al EAĈSR en Praha XIX., Uralské 447.

# INTERNACIA KONFERENCO ESPERANTO EN LA MODERNA VIVO

okazos en Paris 14.—17. majo 1937.

Sekcioj: Esperanto en lernejojn.
Internacia trafiko.
Sciencoj kaj Teknikoj.
Intelektaj interŝanĝoj.

Kotizoj de la Konferenco:

I. Konferenca kotizo 100 fr. fr.
II. Kotizo por familiano 75 fr. fr.
III. Kotizo por gejunuloj malpli ol 18-jaraj 60 fr. fr.

Adreso: Internacia Konferenco „E. en La Moderna Vivo", 34, Rue de Chabriol, Paris 10.

Ni jam donis al sekretariejo de la Konferenco liston de ĉsl. publikjuraj korporacioj por invitiĝi ilin oficiale. Ni petas niajn anojn, kiuj posedas influon en unuiĝoj de publika aŭtoritateco, ke ili invitiĝu ilin kaj proponu sin kiel iliaj delegitoj por la konferenco.

Ni tre rekomendas al niaj aktivuloj legi la informojn pri la Konferenco en Heroldo kaj en E. Internacia.

---

## Ricevitaj libroj kaj gazetoj.

Librojn, ĉe kiuj estas notita prezo en Kč, liveros la Libroservo EAĈSR afrankite por la notita sumo.

*Josef Zauner, Por UŜE-iniciatoroj.* Eld. UŜE-EĤO, Timisoara. 32 pĝ 11x15 cm. Prezo Kč 2·50. Broŝuro pri la projekto de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo, diferenciĝanta de la movado Paneŭropa ĉefe en tio, ke ĝi postulas unuiĝon de ĉiuj ŝtatoj eŭropaj inkluzive Britujo kaj USSR. Enestas ankaŭ diversaj ideoj pri propagando de esperanto kaj pri ĝia instruado.

*Bulteno de la Adreslibro de pollandaj esperantistoj.* Unua kajero. Julio 1935. Redakcio Warszawa, Aleje Jerozolimskie 101. 40 pĝ 15x21 cm. La sama eldonejo eldonis en 1931 adresaron kun la konsiderinda nombro de 4060 nomoj de polaj esperantistoj. Nun ĝi preparas novan eldonon, kiun ĝi volas aperigi en kajeroj. En la unua — sole tiun ni ricevis en la manojn — estas 887 adresoj.

Sekvas 9 eldonaĵoj de *Tagblatt-Bibliothek* (Steyrermühl-Verlag, Wien I., Wollzeile 20), verkitaj de la talenta dro Emil Pfeffer. Salutindaj helpiloj por niaj germanlingvaj amikoj. Por la notitaj prezoj liveras la Libroservo de EAĈSR. Formato 12x19 cm.

*Esperanto en 10 lecionoj.* Metoda lernolibro por germanoj. Enhavas gramatikon, ekzercojn, tradukŝlosilon. Por meminstruo kaj kursoj. 48 pĝ. Kč 2·90.

*Unua esperanta legolibro* por komencantoj kaj kursoj. Elektita prozo kaj poezio kun laŭvorta germana interlinia traduko. 48 pĝ. Kč 2·90.

*Vortaro esperanto-germana.* Enhavas ĉiujn vortradikojn kaj multajn fakesprimojn. 48 pĝ. Kč 2·90.

*Vortaro germano-esperanta.* Pli ol 20.000 germanaj vortoj kaj 30.000 esp. tradukoj. 184 pĝ. Kč 10·60.

*Ich spreche Esperanto!* Enkonduko en la esperantan konversacion. Dialogoj pri diversaj temoj kun germana traduko kaj lingvaj klarigoj. 56 pĝ. Kč 2·90.

*Esperanta komerca korespondo.* Modeloj de leteroj pri la plej gravaj okazaĵoj de la negoca vivo. Fakaj klarigoj kun germana teksto. 96 pĝ. Kč 5·40.

*Humor' de l'mondo en esperanto.* La ŝerco, sprito kaj anekdotoj en esperanto kaj germana traduko. 96 pĝ. Kč 5·40.

*Fabeloj de l'Oriento.* Fabeloj kaj legendoj el Azio kaj Afriko en esp. kaj germ. lingvo. 96 pĝ. Kč 5·40.

*Zamenhofaj paroladoj,* faritaj ĉe la malfermo de univ. kongresoj (1905—1912). Bulonja deklaracio, letero pri la deveno de E. kaj „Mia penso". Originala teksto kun germana traduko. 166 pĝ. Kč 10·80.

*Princlando Liechtenstein* ĉe Rhein. Nova gvidfolio kun multaj bildoj el tiu ĉarma alpa lando vizitinda same somere kiel vintre. Liechtenstein kun siaj majestaj montaj regionoj, kun siaj trankvilaj promenejoj, estas ideala restadejo por serĉantoj de ripozo. Antaŭ faro de plano por via libertempa vojaĝo postulu tiun gvidfolion, kiun senpage liveras „Hohe Regierung de Liechtenstein, Vaduz, Liechtenstein".

*Mikaelo Gitterman, Normigo.* Trad. el rusa A. Samojlenko. Eldonis Ekrelo, Moskva. 16 pĝ 15·5x22 cm. Prezo ne notita. Interesa studo pri la esenco de normigo kaj pri disvastiĝo de la normoj en diversaj landoj.

---

Mendu precipe por la lokaj grupoj:

**100 poŝtkartojn diverspecajn**

po 12 Kč afrankite.

Mendojn sendu al EAĈSR en Praha XIX., Uralské 447. Monon sendu samtempe per paĝilo.

**ĈEĤOSLOVAKA ANTOLOGIO**

*Internacia kritiko nomas la verkon fiero de esperanta literaturo. Montru, ke vi komprenas, kion ĝi signifas por ni, ĉeĥoslovakaj esperantistoj.*

*Ni povas plenumi rapide ĉiujn mendojn.*
*Prezo Kč 60.— broŝ., Kč 80·— lukse bindita.*

Vychází 6krát do roka. — Vydavatel: Svaz esperantistů ČSR. v Praze XIX., Uralské n. 447. — Zodpovědný redaktor Fr. Slavík — Tiskne A. Pražák, Jablonné n. O. — Novinová sazba povolena Ředitelstvím pošt a telegrafů v Praze, č. 102.047-VII-1933. - Podací úřad Praha 45.